

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



58a jaro n° 2  
marto - aprilo


# Sonorilo

oficiala dumonata bulteno de B.E.F.

**REDAKCIO :** jaumotte maurice  
roose fernand, sint-klaradrsef 59, brugge tel. (050) 319.81  
maertens grégoire  
poupeye charles

**kunlaborantoj al regulaj rubrikoj :**  
dr. pol denoël durwael ivo iserentant roger

**ADMINISTRADO :** terryj j. raapstraat, 72 gent



**ASOCIO SEN PROFITA CELO** sidejo & prezidantejo

debruynlaan 44, wilrijk tel. (03) 377752

**HONORA PREZIDANTO** honora vicprezidanto  
kempeneers paul sielens henri

**ĜENERALA PREZIDANTO** honora vicprezidantino  
jaumotte maurice plyson j.

**PREZIDANTOJ**  
debrouwere gerard, magdalenastraat 29 kortrijk  
dro denoël pol, 20 rue v. raskin liège

**UNUA VICPREZIDANTO**  
roose fernand

**VICPREZIDANTO ŝAKESTRO PRI TEĤNIKAJ RIMEDOJ**  
verstraeten jules, sint bernardse steenweg 107a hoboken

**ĜENERALA SEKRETARIO**  
de roover r., luchtvaartstraat 23 borgerhout

**SEKRETARIO POR LA NEDERLANDINGVA REGIONO**  
maertens grégoire, prins leopoldstr 51, st-kruis tel. (050) 34935

**SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO**  
de cuyper georges, 66, rue de dortodot, monceau sur sambre

**KASISTINO** terryj juliette, raapstraat 72, gent

**POŝTKONTO DE B.E.F. :** 1634.34 RAAPSTRAAT, 72, GENT

**ĈEFDELEGITO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**  
fr. schellekens, frans hensstraat, 44, antwerpen 2  
p.k. 9051.25

## LOVENO

Al Loveno la naturo ne donacis nerezisteblajn pejzaĝojn.

En Loveno oni ne serĉu sovaĝajn montojn, profundajn ravinojn, larĝajn panoramojn, en kiuj sablo kaj akvo formas la ĉefelementojn. Tiuj apartenas ja al Ardenoj kaj Marbordo.

Loveno kontraŭe estas arturbo kaj Universitata centro, kie Lovenano ĝuas propran vivon, kie vizitanto sin tuj sentas hejme, kie kongresisto vidas siajn altajn esperojn plenumitaj, kie fremdulo povas esprimi nur sian admiron.

Se vi vizitas Lovendon dum la specifa somerlibertempo, vi trovas urbon kvietan, iom dormemantan, en ripozo post vigla akademijaro. Nur la aŭtotrafiko povas, je certaj horoj, ŝanĝi la bildon de tiu ripozo; ĝi venigas ĉiujare, en tiu sezono, multajn dekmilojn da vizitantoj. Se vi venas en Lovendon dum la periodo de Oktobro ĝis Majo, vi trovas tie la junan vigelecon karakterizan por universitaturbo, kiu nombras ĉirkaŭ 20.000 gejunulojn kiel adoptitajn enloĝantojn. Sed, dum la tuta jaro, tie paradas por la turistoj la multegaj vidindaĵoj, atestante pri glora pasinteco. La malkvieta historio de la malnova duklando Brabanto parolas el la artverkoj de tiu estinta ĉefurbo, kies lingvon ĉiu vizitanto povas kompreni aŭ almenaŭ senti.

Ĉiu jarcento metis iun stampon sur la urbon kaj postlasis ion, kio kontribuas por fari de Loveno artcentron kaj grandan plenaermuzeon de arkitekturo. Kiel urbo reprezenta de iamaj gildoj, de retorikaj unuiĝoj, de artistoj, de scienculoj, kiuj valorigis sian influon eĉ ekster la limoj de nia lando, Loveno rakontas pli bone ol kiu ajn alia urbo, ĝojon kaj doloron de niaj prapatroj.

La evoluo de kerno ĝis urbo, sub la administrado de la Loveno Domo, la memoro pri floranta drapindustrio, la Brabanta demokrata ribelo, la regado de Karlo Kvina kaj lia filo Filipo Dua, la malkvieta 17-a jarcento, dum kiu la neretenebla Lovenano ne ŝanĝiĝis, la reŝanĝo sub la Aŭstria regado, la fatala Franca periodo kun ĝiaj multaj reformoj, la Nederlanda okupado kaj la 19-a jarcento kun ĝiaj multaj reformoj, kaj la 20-a jarcento kun ĝiaj mondmilitoj kaj la rekonstruado de la urbo: ĉion la vizitanto retrovas en la konstruaĵoj dismetitaj interne de la urblimoj. Dum vizito de la urbo, revivas por li la historio de granda popolo.

La urbcentro prezentas unikan aspekton; kun la belega fono de la malfrugotika urbdomo, kun la kanonika preĝejo S. Petro, kun la novgotika « Tablorondo » (Tafelronde) kun la similigitaj gildodomoj, la ĉefplaco lasas neforgeseblan impreson. Tie ĉi la 15-a jarcento revivas en la urbodomo, en la preĝejo kaj en la iama ejo de la lovenanaj gildoj kaj retorikaj unuiĝoj.

Mathieu de Layens, arkitekto de la urbodomo, mirige komprenis kaj plenumis la taskon al li komisiitan. Li sentis ke en konstruaĵo de civila arkitekturo konvenas la mezepoka pieco kaj la eternigo de eminentaj

personoj. Tial li ornamis la fasadon de la urbdomo per Bibliaj scenoj kaj en la 19-a jarcento, skulptistoj kun artisma talento ĉizis statuojn de imperiestroj, reĝoj, dukoj, grafoj, artistoj, scienculoj, kleruloj, k.t.p.

Iom ekster tiu urbocentro batas la koro de Universitato pli ol kvincentjara. La iama draphalo, en frugotika stilo, la Kolegioj de S. Spirito, de Papo Adriano, de Maria Teresia, de la Premonstratoj, de Arras, la iama Kolegio Van Dale, estas rimarkindaĵoj kiujn vi tie ekkonas.

Vi trovas tie la spiriton, kiu vivis en la pasintaj jarcentoj, kiam Justus Lipsius, Erasmus, Busleyden, Vesalius kaj aliaj kleruloj aliĝis al nia Alma Mater.

La Lovenaj preĝejoj en kiuj kuŝas esprimo de profunda pieco, estas ornamitaj per artverkoj. Pentroarto, skulptarto, artoj aplikitaj kreas atmosferon ne sufiĉe laŭdeblan, eĉ post ripetita vizito. Tio valoras tiom por S. Petro, kiom por S. Mikaelo, kun ĝia pompa fasado, por S. Jakobo, por la etosa preĝejo de la Beginejo, por S. Kvinto, S. Gertrudo, Nia Sinjorino de la Predikantoj kaj aliaj preĝejoj.

La Granda Beginejo, urbo interne de la urbo, ankaŭ invitas vin al vizito. La kolorabundo en la buntaj nuancoj de la tegmentoj, la tipe mallarĝaj stratetoj, la riĉa diverseco en la domkonstruado, la etoso kiu tie regas, plene pravigas viziton.

En la urbo troviĝas dise la restaĵoj de la unua ĉirkaŭmuro (12-a jarcento) konceptita kiel milita defendzono. Je la plej neatenditaj lokoj paradas ankoraŭ peco da muro aŭ turo iam la gloro de la Lovenanoj.

En Loveno restas eĉ pli multo kio estas vidinda. Muzeoj, abatejoj, privataj domoj, la eksterordinare luksa universitatbiblioteko, kun ĝia svelta turo, provizita per sonorilaro, invitas vin al vizito. Ili pravas ke en Loveno nova kaj malnova akordiĝas harmonie.

Loveno postulas trankvilan viziton, prefere sub kondukado de Lovena gvidisto, kiu fiere vin irigos tra la stratoj kaj bonvenigos vin en tiu centro de arto kaj kulturo, kio Loveno fariĝis dum la jarcentoj.

Tial ni diras al vi hodiaŭ : ĝis revido en Loveno.

HET WELGEKENDE  
MAGAZIJN VOOR MODERNE HERENKLEDING

**in't duifken**

GROTE KEUS  
IN GERED E KLEDING.


KOSTUMEN - SPORTJASSEN - BROEKEN  
UNIFORMEN - GABARDIENEN - LODENS  
STIJLVOL MAATWERK

KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN

RABATO POR ESPERANTISTOJ

**LA PETICIO** — La Laboro ne finiĝis

Ni ricevis multajn litojn de S-ro Lödör el Gent kaj de W. de Smet el Overijse; novaj sukcesoj de el Antverpeno: S-ro Van Eynde R. nun kolektis 182 foliojn  $\times$  20 = 3640 subskriboj kaj S-ro H. de Roover, nia ĝenerala sekretario, 85 foliojn  $\times$  20 = 1700 subskriboj.



48 a kongreso de B.E.F.

28, 29 & 30.5.1966

Loveno  
pentekosto

ADRESO POR KORESPONDADO

S-ino Meurrens, Naamsestraat, 78, Loveno.

#### HONORA KOMITATO

Kardinalo Seunens, ĉefepiskopo de Belgujo

Monsinjoro A. Descamps, Episkopo de Tunis, Rektoro de la Universitato

#### LOKA KONGRESA KOMITATO

Prezidanto	D-ro Fern. PIOT
Vicprezidantoj	S-ino A. Meurrens S-ano Arni Decorte
Sekretario	S-ro Ch. Jacobs
Adj. Sekretariino	F-ino M.T. Henquinez
Kasistino	F-ino M. Saelemaekers
Membroj	S-ro F. Frantzen S-ro J. Van Bilsen S-ro H. Boving S-ro E. Devleeschauer S-ino F. Devleeschauer F-ino G. Noynaert S-ino J. Silhan D-ro Wim De Smet S-ro P. Maes

#### ALDONOJ AL LA PROGRAMO

17-a horo : vizito al Muzeo Vanderkelen sub gvidado de S-ro Paul Maes (konservatoro de la Publikaj Asistancoj).

La muzeo situas en la Savoyestrato, 6.

La akcepto en la urbodomo okazos je la 11.30 h.

17-a horo : Sankta Meso en St Miĥaelo kun prediko de Kan. Gillet ; la preĝaro en esperanto por la celebronto kaj por la asistontoj farita de Frato Arni.

SPECIALA POŝTOFICEJO funkcios en la AKCEPTEJO (Salons Georges) kun speciala stampo okaze de la kongreso.

Telefono S-ino Meurrens : 239 50

Akceptejo : 272 40



## AL LOVENO

# NOVAJ KONGRES- ENSKRIBOJ

Aalst  
F-ino P. De Cock  
Antwerpen  
F-ino Leibovitche  
S-ino M.Th. Meulemans  
Bruselo  
Gesinjoroj R. Jacobs  
F-ino Kestens M.  
Kessel-Lo  
S-ro J. Laenen  
Leuven  
F-ino Derwa  
S-ro P. Maes  
Liège  
F-ino E. Champy  
Mechelen  
S-ro M. Naster  
Overijse  
S-ro W. De Smet

## FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631  
Hoboken

Vitraloj - Speguloj -  
„securit“ vitro  
kolorigitaj vitroj  
alumintaj senmastikaj  
stangoj por kupoloj

Vitro-cementoj por  
tutvitra-konstruaĵoj  
mastiko  
telefono 37.88.20

# E. L. M. WENSING

## LA LINGVA

## PROBLEMO

## EN

## INTERNACIAJ

## EKONOMIAJ

## RILATOJ

teknikisto, scienculo kaj normala homo, ke ili studu fremdajn lingvojn. La rezulto de tiu pensmaniero kaj vivkoncepto estis, ke la lingvo-studo fariĝis en multaj landoj la speciala okupaĵo de unuopaj individuoj kun la ĉefa emfazo sur la intelekta kaj kultura enhavo de la lingvo, sed konsiderinde malpli sur ĝia valoro kiel medio de tuja interkompreniĝo inter homoj de malsamaj lingvo-grupoj.

Eĉ hodiaŭ ankoraŭ ekzistas tiu tradicio en la eduka sistemo de pluraj nacioj por fokusigi la instruadon de fremdaj lingvoj unuavice sur literaturo kaj histori-esplorado. En Usono kaj Britujo vi ne estu surprizita, se la gimnazianoj scipovas legi en franca lingvo librojn de Racine, Molière kaj aliaj klasikaj aŭtoroj, samtempe sperante la plej grandajn malfacilaĵojn kiam ili devas fari eĉ simplan konversacion en tiu sama lingvo.

Tamen, ĉie en la mondo estiĝas pli-malpli rapide la konvinko, ke la studo de fremdaj lingvoj estu unualoke praktika, tio estas, ke oni kapablu flue paroli la fremdan lingvon, por ke ĝi plenumu sian ĉefan socian funkcion. Ekzistas multaj homoj kiuj kredas ke la studo de fremda lingvo aŭ de pluraj fremdaj lingvoj ne plu estas necesa, ke tradukistoj kaj modernaj traduk-maŝinoj superfluigis la neceson de fremdlingva studado. Ili tamen libervole ignoras la realan problemon kaj pretervidas la enorman ŝarĝon en tempo, mono kaj konveno kiu estas kunligita

La plej frapaj kaj karakterizaj trajtoj de la hodiaŭa mondo, diferencigantaj ĝin de ĉiuj antaŭaj epokoj, sendube estas la interdependeco de nacioj kaj civitoj, kiel ankaŭ la sensignifeco de distancoj dank' al modernaj interkomunikaĵoj. Fakte neniu nacio povas ekonomie izoligi sin, nek konduki aŭtonoman ekzistadon, fortranĉitan de aliaj landoj.

Tio estas la ĉefa motivo, kial la tradicia ebleco — kiun nur malmultaj havis por studadi fremdajn lingvojn — ŝanĝiĝis komplete en absolutan neceson.

Longtempe oni konsideris, en multaj landoj, la studon de fremdaj lingvoj kiel la privilegion de relative limigita elito intelekta. Kaj tiu lingvostudado grandparte koncentriĝis sur la verkita historio de la nacia kulturo kaj ĝia literaturo. Malmultaj estis ĝisfunde konvinkitaj pri la absoluta neceso por

kun tuja tradukado en diversajn aliajn lingvojn de la buŝaj kaj skribaj transakcioj inter lingvo-diferencaj landoj.

La ŝancoj, kiujn posedas nuntempe Esperanto kiel interlingvo inter la popoloj, estas jam multe pli favoraj ol antaŭ 20-30 jaroj, ĉar la mondo en la tiama tempo, ne tiom akre sentis, nek praktike, nek spirite, la grandegan bezonon de facila interkomprenilo inter la popoloj. Landlimoj, kiel praktikaj baroj inter homoj de diferencaj landoj, estas rapide malaperantaj. Baldaŭ venos la tempo, ke okcidenteŭropanoj ne plu bezonos pasporton por libere kaj senĝene vojaĝi en la tuta teritorio. La fina fazo de la Eŭropa Komuna Markto antaŭvidas la eblecon de laboro por ĉiu okcidenteŭropano en ĉiu nacio de la Komunumo. Similaj grupoj de ekonomiaj potencoj formiĝas aŭ jam estas forĝitaj en aliaj kontinentoj aŭ globpartoj. En Sudameriko la LAFTA-bloko komprenas grupon de latin-amerikaj nacioj, kie la lingva problemo ne tiom malhelpas la interkomprenon kiom en aliaj ekonomiaj grupiĝoj — kvankam en LAFTA oni baraktas kun influoj de lingva prestiĝo rilate al la uzo de portugala aŭ hispana lingvoj. La plej evoluinta kaj integriĝinta ekonomia bloko verŝajne estas la Orientbloko, kie — sub la gvidado de Ruslando — kunlaboras Pollando, Ĉeĥoslovakio, Hungarujo, Rumanujo kaj Bulgarujo. Ĉiu kiu estas iomete informita pri la grandegaj lingvaj diferencoj, ekzemple inter la rumana kaj ĉeĥa lingvoj, rusa kaj hungara, facile ekkomprenos, ke la reciproka interkompreno inter tiuj ŝtatoj — aparte de aliaj konsideroj de politika karaktero — lasas multon por deziri.

Per tiuj kelkaj ekzemploj kaj citaĵoj, mi nur intencis substreki du tre gravajn konstataĵojn:

- a) la unuopaj nacioj, en la hodiaŭa mondo, ne plu povas konduki sendependan ekonomian vivon; la moderna tekniko de transportiloj kaj interkomunikaj sistemoj ignoras distancojn kaj interdependigas ĉiujn ekonomiojn.
- b) la neceso de unu lingvo — apud la naciaj — parolata de ĉiu kies interesoj aŭ kontaktoj, sur kiu ajn kampo de la moderna vivo, preterpasas kaj transiras la naciajn landlimojn, altrudas sin ĉiutage pli urĝe.

Ni, Esperantistoj, ne plu bezonas teoriajn aŭ praktikajn klarigojn por konvinkiĝi ke neniu el la ekzistantaj lingvoj povos iam plenumi tiun internacian rolon. Aparte de ŝovinismaj konsideroj, kiuj pli ol io ajn malhelpos la ĝeneralan tutmondan akcepton kaj agnoskon de ĉiu el la ekzistantaj lingvoj, ni ne ignoru la gravan fakton de facila lernebleco. En Nederlando estas tute normale ke oni studadu dum multaj jaroj la francan, anglan kaj germanan lingvojn. Sed, parolante el propra sperto, mi devas honeste konfesi, ke la rezulto de tiu longjara penado, de tiu temporaba cerbumado super gramatikaj lernolibroj, multfoje estas neniel proporcia al la streĉa klopodado.

Daŭrigo en la sekvonta numero.

LES ENTREPRISES
<b>DERKS</b>
226, Rogierstrato, BRUSELO 3
Tel. : 16.89.92    Entrepreno de
KONSTRŬAJOJ

**PUBLIKA LETERO DE HUNGARAJ OLIMPIAJ  
ĈAMPIONOJ KAJ SPORTISTOJ AL LA  
INTERNACIA OLIMPIA KOMITATO**

(Publikigis « Népszava » - « Voĉo de popolo » - la centra ĵurnalo de la Landa Konsilantaro de la Hungaraj Sindikatoj en la numero de 30. jan. 1966.)

Ni, hungaraj sportistoj, ĉampionoj de internaciaj konkursoj kaj olimpikoj, alvokas la Internacian Olimpian Komitaton pro grava sportafero.

Dum nia sportkariero, jam dum multaj internaciaj renkontiĝoj ni spertis la imponan moralan kaj fizikan eduk-efikon de la sporto kaj ĝian nemezureblan forton akcelantan la amikecon kaj pacan konkuron de la popoloj. Inter sportistoj la sporteca interluktado iom post iom kreas reciprokajn amikigojn. Tiakarakteraj sportaj renkontiĝoj kreskigas ankaŭ la aprezon de aliaj popoloj kaj de ilia kulturo. Tiu ĉi estas unu el la plej gravaj celoj de la olimpikoj kaj la plej nobla esenco de la olimpia ideo.

Sed vera amikeco povas elkreski nur el tiaspeca sporta konatiĝo, kiu povas eĉ pludaŭrigi kaj parigi kun interŝanĝo de la pensoj. Sed ni ja scias, ke tiaspeca daŭra internacia sportamikeco troviĝas nur malmulta, kiel ajn deziras tiun la sportistoj de ĉiuj landoj. Ĉi tiun situacion kaŭzas la bone konataj lingvaj malfacilaĵoj. La granda plimulto de la internaciaj konkurantoj povas diri apenaŭ nur kelkajn vortojn, ŝablonajn frazojn al la alia kaj multaj el ili eĉ tiom ne kapablas. Kaj ja vere ne estas eble, ke nin ĉiujn akompanu interpretistoj, se ni intencas interparoli kun niaj alilingvaj sportkamaradoj, kun la spektantoj, aŭ kun la loĝantoj de la lando, aranĝanta la turniron.

Ĉi tio grave malfortigas, kripligas la prosperigon de la olimpia ideo. El ĉi tio sekvas la bedaŭrinda misaĵo, ke la plimulto de la konkurantoj povas kompari nur sian korpan, fizikan forton. Antaŭ kaj post la turniroj nur malmultaj el ni kapablas por iom da interhoma parolado, por komunikado de pensoj kaj sentoj. Ni, la filoj de la dudeka jarcento jam ne povas kontentiĝi per la sportkonatiĝoj, kiuj okazas sen interŝanĝo de la pensoj.

Konklude el ĉio ĉi, ni turniĝas al la respektindaj gvidantoj de la sportmondo, al la INTERNACIA OLIMPIA KOMITATO per la peto: ili akcelu, ke dum la internaciaj sportaj renkontiĝoj la ĉiam pli populariĝanta Esperanta lingvo estu akceptata kaj uzata kiel interkonsentita, oficiala lingvo.

Do, ni, hungaraj sportistoj proponas al la Internacia Olimpia Komitato: akcelu, ke Esperanto povu fariĝi la latino de la internaciaj sportkonkursoj, de tiuj specialaj, pacaj konkuroj de la popoloj. Ankaŭ nia karmemora olimpia ĉampiono, d-ro Ferenc Mező, iama ano de la Internacia Olimpia Komitato, plurfoje deklaris, ke en sportaj interkontaktiĝoj havus grandan signifon la interkonsenta enkonduko de Esperanto. Tiel la sportistoj de la mondo ĝoje kaj rapide ellernus ĝin, ĉar per ĉi tiu facila internacia lingvo kun ĉiuj niaj sportistaj kamaradoj ni povus nin bone komprenigi...

La olimpia ideo nur tiamaniere povus kompletigi kaj tiel ĝi povus eĉ pli efike servi la pacan, kulturalan konkuron de la popoloj. Do, se ankaŭ Internacia Olimpia Komitato protektos Esperanton, tiam ĝi komencos grandsignifan iniciaton en la sporthistorio de la mondo - kaj tio estos ĝia nevelkebla merito.

Ĉi tiun nian alvokon pere de la esperantista gazetaro kaj radiodissendoj ni venigos al la sportgazetoj kaj sportkronikoj de la internacia gazetaro, petante ties publikigon kaj apogadon.

Esperante la atensigon de la sportamikiĝo kaj de la olimpia ideo, ni atendas pozitivan apogemon de la Internacia Olimpia Komitato kaj de la sporta publika opinio de la mondo.

Budapest, januaro 1966.

Ni propramane subskribis :

**Kalman Vandor**  
**József Sakovics**  
rapira mondĉampiono  
de la Skermasocio  
**d-ro Ferenc Török**  
olimpia kaj mondĉam-  
piono de pentatlon  
**Józsefné Janya**  
mondĉampiono de  
manpilko  
**Ferenc Bene**  
ano de la ĉampiona  
futbalteamo en Tokio  
**Gyula Zsivóczy**  
mondrekordulo de  
martelĵeto  
**Tamas Gabor**  
ano de la olimpia  
ĉampiona rapirteamo  
en Tokio  
**Lidia Dömölky**  
ano de virina rapir-  
teamo, olimpia ĉam-  
piono en Tokio  
**Tibor Kőszegi**

**Dezscő Gyarmati**  
triobla olimpia ĉam-  
piono de akvopolo  
**Zoltan Dömötör**  
olimpia ĉampiono de  
akvopolo, triobla  
Europa ĉampiono  
**Andras Balczó**  
olimpia kaj mondĉam-  
piono de pentatlon  
**Andras Sente**  
Europa ĉampiono de  
kajak  
**Ferenc Varfi**  
**Janos Buruncz**  
**Mihaly Mayer**  
duobla olimpia ĉam-  
piono de akvopolo  
**Antal Szentmihalyi**  
ano de la ĉampiona  
futbalteamo en Tokio  
**Arpad Barany**  
ano de la olimpia ĉam-  
piona rapirteamo en  
Tokio

**Laszlo Papp**  
triobla olimpia ĉam-  
piono de bokso  
**d-ro György Karpati**  
triobla olimpia ĉam-  
piono plurobla mond-  
ĉampiono, de  
akvopolo  
**Ferenc Sidó**  
naŭobla mondĉampiono  
de tablotenis  
**Miklós Ambrus**  
olimpia ĉampiono de  
akvopolo  
**Istvan Dobo**  
sportreportero  
**Imre Németh**  
Londona olimpia ĉam-  
piono de martelĵeto,  
prezidanto de la  
« Hungara Atletika  
Asocio »  
**György Szepesi**  
sportredaktoro de la  
Hungara Radio

**Sandor Bares**, parlamenta deputito, prezidanto de  
la Landa Asocio de Hungaraj Publicistoj, vicprezi-  
danto de Europa Futbal-Asocio UEFA.

NIA GAZETARA SERVO SENDIS LA TRADUKON AL LA NACIAJ  
GAZETOJ. BONVOLU EVENTUALE SENDI LA GAZET-ARTIKOLON.

Ensendojn por la maja-junia numero ni  
petas antaŭ la 1.5.1966

#### KARAVANO AL BUDAPEST

Krom la jam menciitaj en la antaŭa gazeto, enskribis ankoraŭ :

**S-ro Volders (Antverpeno)** - **F-ino Kestens (Bruselo)** - **Ges. Ockey (Britujo)** -  
**Ges. Brookes (Britujo)** - **Ges. Kilmer-Thio (Nederlando)** - **Ges. Vandeveld**  
**(Gento)** - **S-ro Verstraeten J. (Antverpeno - por la irvojo)** - **Ges. Sprengers**  
**(Mehleno)** - **F-ino Sprengers G.** - **Ges. Middlemast (Brit.)** - **S-ro Jaap Rooke**  
**(Ermelo - Nederlando).**

Entute jam 26 personoj enskribis, krom preskaŭ dek personoj kiuj ankoraŭ  
ne decidis !

Ĉiuj personoj ricevos la en detaloj priskribitan vojaĝplanon, kun indiko de  
hoteloj kaj restoracioj kie ni tranoktos aŭ tagmanĝos.

Se vi ankoraŭ hezitas : venu kun ni, eĉ se vi nur disponas pri 14-tagoj : vi  
envere nur bezonas dekkvar tagojn se vi veturas kun ni ĝis Budapest, do tra  
Germanujo kaj Ĉeĥoslovakujo, aŭ, dua ebleco, foriras kun ni de el Budapest  
(tra Aŭstrujo kaj Germanujo).

Informojn : Maertens G.  
Pr. Leopoldstraat 51  
Sint-Kruis

## LA AMBAŬADORO DE AŬSTRALIO VIZITIS LA ATENEON DE VERVIERS KAJ ĈEESTIS LECIONOJN PRI GEOGRAFIO KAJ ESPERANTO

La studentoj de Kings Meadows High School en Launceston en  
Tasmanio esprimis la deziron kontakti kun studentoj de belga lernejo  
kie oni instruas la Anglan kaj Esperantan lingvojn. Sekve la ambasadoro  
S-ro Harry, kiu mem estas esperantisto, direktis sin al la belga minis-  
terio, kaj inter la menciitaj lokoj li elektis Verviers. Baldaŭ ekestis  
fervora korespondado inter tiuj Verviersanoj kaj la Tasmanianoj. Sed  
iom poste S-ro Harry deziris viziti tiun lernejon. La tiea prefekto,  
S-ro Mathieu, ĝoje akceptis. La vizito okazis la 2-3-'66.

Antaŭ ol iri al la nomita ateneo, li vizitis ankaŭ la urbodomon. En  
la lernejo la ambasadoro ĉeestis en la 4-a Latina klaso lecionon pri  
geografio, donita de S-ro J. Pirotte. Poste oni eniris la esperanto-klube-  
ton sub gvidado de S-ro Vanbreuse. Filmoj estis projekciataj. Poste  
okazis manĝo al kiu ĉeestis la profesoraro kaj la urbestro. Pri ĉio tio  
aperis longa artikolo en « La Meuse - La Lanterne ». Ĉu necesas diri ke  
tiu evento impresis forte lernejaĵajn kaj administraciajn gvidantojn de  
Verviers ? Saluton kaj gratulon al la pioniro de esperanto, Prof. Van-  
breuse !



Jam de plural jaroj Esperanto-kurso estas oficiale gvidata en la Ateneo de  
Verviers, laŭ iniciato de Prof. Georges VANBREUSE, kiun oni vidas sur la  
supra bildo (dekstre, kun blanka hararo).

Tiu foto estis farita okaze de vizito de S-ro HARRY, ambasadoro de Aŭstralio  
en Bruselo, mem esperantisto, en Verviers, kie li ĉeestis la Esperanto-lecionon  
kaj lecionon pri Aŭstralio. La ambasadoro estas videbla dekstre de S-ano  
VANBREUSE (maldekstre estas S-ano JACOB José, ankaŭ Esperanto-profesoro  
en la Ateneo). La du personoj maldekstre sur la bildo estas la lernejestro  
S-ro MATHIEU kaj S-ro GERARDY, inspektoro pri franca lingvo, kiu akompanis  
la ambasadoron, nome de la ministro pri edukado.

# ESPERANTO - KONGRESO BUDAPEST

por via vojaĝo per aŭtomobilo

vagonaro

aviadilo

la vojaĝagentejo

## BELGATOURIST

Parochiaanstraat 17 Brussel 1

17 rue des Paroissiens Bruxelles 1

Tel. 134332

povas helpi vin por la rezervigo de hoteloj

la trajnbiletoj

la aviadilbiletoj

la vizo

10 tagoj en Budapeŝt + aviadila vojaĝo = 6.520 Fr.

### KATOLIKA ESPERANTO-MOVADO EN NIA LANDO

Kelkaj Esperantistoj el nia lando iniciatis fondkunvenon de katolika Esperanto-movado en Belgujo. Provizora komitato estis elektata dum kunveno en Bruselo la 27.3.66 sub la prezidanteco de S-ro Toint el Lieĝo. Akceptis honorofican postenon F-inoj Simon (Lieĝo) kaj Enzlin (Antverpeno) kaj S-roj Alderson, Haase, Steenhout, Vermuyten. Konsilantoj de tiu provizora komitato: F-inoj Champy (Lieĝo) kaj Geelen (Antverpeno), S-ro Debruyne (BEFA), S-ro Maertens (sekr. Bef), kaj S-ro Paesmans (Antverpeno).

Gemeligo de la urboj CHARLEROI kaj HIMEJI (Japanujo)...  
kaj de ties esperanto-grupoj.

Tiu gemeligo estis decidita de la urbestro je dato 12-6-'64. La Karlora Esperanto-grupo sekvis tiun ekzemplon. La unuan de Jan. '66 alvenis de la prezidanto de urba konsilantaro de Himeji letero distinita al la loĝantoj kaj al la esp. grupo de Charleroi, letero en kiu estis menciita la vizito al M. de la Belga Gereĝa paro kaj de samideano De Kegel! Same alvenis letero de la Japana urbestro por tiu de Charleroi. Jen belega ekzemplo kiel kunligo de esperanto al alla manifestacio povas vekti interesigon kaj simpatian por nia afero.

Ankaŭ pri tio raportis tre detale «Le Journal de Charleroi» (14-2-66). Gratulojn al F-ino Orsolini kaj ŝiaj kunlaborantoj.

### ANTVERPENO

Esperanto-grupo «La Verda Stelo»

Kunsidoj:

Ciuvendrede en «Witte Leeuw»

Frankrijklei, 4 je la 20,15-a horo.

Postĉeknumero: 726.54,

La Verda Stelo-Deurne.

La 29-an de oktobro S-ro R. Van Eynde organizis dokumentfilman vesperon kie la Esperante parolata filmo «Antarktiko», parolata de F-ino A. Geelen, denove surprizigis la ĉeestantojn.

La 5-an de novembro S-ro H. De Roover laŭ tre humoriga maniero rakontis pri siaj «Vojaĝimpresoj el Francujo» kie li travivis plurajn aventurojn kun siaj familianoj. La vere artaj dia'oj sugestis substrekis la petolan tekston de la paroladisto.

La 12-an S-ro R. Balleux montris lumbildojn kaj talente memverkitajn desegnaĵojn pri la svisa regiono de Leysin.

La 19-an denove la vic-prezidanto, S-ro H. De Roover, sin prezentis antaŭ la publiko per prelego pri «La Nutraĵo en la Mondo». La ekscio ke 2/3 de la monda popolo malsatas, la statistikoj pri la teruraj sekvoj, la agado de la diversaj mondaj instancoj UNICEF, Oxfam, la Ruĝa Kruco, k.t.p. kreis atmosferon kiu igas pripensi la problemon pli intense. La granda serio da lumbildoj estis tiel okulfrapaj kiel imponaj sed aliflanke dramaj kaj eĉ kruelaj.

La 26-an la F-inoj Helena kaj Mathilde Hofkens prizorgis la programon. La unua per paroladeto pri la vivo de bestoj, precipe de ursoj kaj simioj, la dua paroladante pri «Vincent Van Gogh, liaj vivo kaj verkoj». Belaj ilustraĵoj - elektitaj per arta gusto, favore helpis krei la ĝustan sferon.

La 3-an de decembro S-ro Van Eynde - dum dokumenta filmvespero, montris Esperantan filmon «Angle Bay» parolatan de S-ro Fr. Schellekens.

La 10-an S-ro I. Durwael dediĉis alt-nivelan paroladon al «La Tago de la Homaj Rajtoj» kaj reliefigis per multaj lumbildoj kaj trafa komentario la 17-an datrevenon de la solena akcepto de tiuj rajtoj. En la gazetaro cetere aperis laŭda raporto pri tiu programo.

Dum la semajnfino de la 11-a kaj 12-a en lernejo de Willebroek, Aug. Van Landeghemplein, Esperanto-ekspozicio, organizita de E.K.I., altiris multajn

## GRUPA VIVADO

interesitojn kiuj admiris la modernan materialon kaj montris grandan intereson por nia lingvo.

La 15-an - escepte je merkredo - Esperanto-Komitato Intergrupa festis la Zamenhofan vesperon en la junulargastejo «Op Sinjoorke». S-ro C. Borremans reĝisoris la tuton. S-ro H. Vermuyten solene festparoladis, dum vasta librostando, aranĝita de Ges-roj R. Balleux kaj S-ro J. Bonte, altiris multajn ĉeestantojn kaj allogis plurajn aĉetantojn. Popoldanĝgrupo «Rondinella» demonstraciis diversajn naciajn dancojn; oni kune dancis, oni kune kantis kaj partoprenis al ŝarado aŭ «kviso».

La 26-an, dimanĉposttagmeze, en la salonoj de «De Witte Leeuw» la jam tradicia kristnaska infanfesteto estis organizata. 25-o da infanoj altabligis en la bele ornamita salono por formangi la kukojn kaj ĉokoladan lakton kiuj aperis en abundeco. La Prez., S-ro Jau-motte, kiel ceremoniestro majstre gvidis la solenaĵon dum kiu la infanoj deklamis kaj kantis - unuope aŭ kune - kaj kreis amuzan sferon: diversaj infanoj eĉ deklamis en Esperanto, Ges-roj H. De Roover flegis la manpupan teatron kaj brile sukcesis kapti la infanan intereson kaj eĉ kunlaboron dum la prezentado! La kulmina punkto tamen estis kiam «Paĉjo Kristnaska» (S-ro R. Balleux) envenis la salanon kaj disdonis la frandaĵojn, fruktojn kaj donacojn. Kunlaboris cetere al la sukceso: S-inoj M. Jaumotte kaj N. Balleux; F-inoj H. Brack kaj C. Schellekens.

La nova jaro 1966 komenciĝis en tre feliĉa sfero. La 7-an S-ro Fr. Schellekens paroladis pri «Libertempaj Plezuroj ĉe la Lazura Marbordo» kaj montris belajn diapozitivajn.

La 14-an, dum la ĝenerala jarkunsido, la kasisto, S-ro R. Balleux, kaj la sekretario, S-ro J. Verstraten, prezentis la jarraportojn kiujn S-ro M. Jaumotte lerte komentariis.

La 21-an S-ro Jo Haazen, lernanto de la jus finiĝinta elementa kurso,

faris admirindan prelegon pri « Pacifistaj Problemoj ». La teksto estis havigita de S-ino Van Hinte el Nederlando, konata « por-paco-laborantino » Temis precipe pri la junulinaj jaroj de la iama nederlanda reĝino Vilhelmino, kiu, dum sia tuta vivo, fakte batalis por la paco en la mondo. La preleganto agrable surprizigis la publikon per bonega pronocado de la lingvo kaj flua facileco.

La 23-an - lunde - por la ekzameno de la elementa kurso 8 gelernantoj sin prezentis. Samtempe por la nova kurso, gvidata de S-ro H. Hoover, enskribigis 2 gelernantoj! Tute ne sukceso, do! Por la perfektiga kurso (profesoro R. Van Humbeek) tamen sin anoncis 4 gelernantoj.

La 28-an, dum solena diplomdisdono, la Prez., S-ro M. Jaumotte, faris enkondukan paroladon post kiu li transdonis diplomojn al la jenaj gelernantoj: S-ino M. Winkelmans; F-inoj G. De Schutter kaj G. Hauteceur; S-roj P. Peeraert, W. Winkelmans, J. Haazen, L. Vermeiren kaj J. Tilkin. Krome ĉiu aidone ricevis ekzempleron de « La Historio de La Verda Stelo ». S-ro J. Haazen, nome de la gelernantoj, alparolis la profesoron, S-ron H. De Roover, kaj transdonis al li belan libron. La profesoro afable dankis. Samtempe oni honorigis S-ron R. Van Humbeek, kiel profesoron de la perfektiga kurso. Li ricevis belan, por li praktikan donacon kaj S-ro F. Herman alparolis lin, siavice, per belsona kaj rimarkinda paroladeto. Por kompletigi la vesperon S-ro R. Van Eynde prezentis dokumentajn filmojn.

Dimanĉon, la 23-an, pli ol 40 personoj, inter kiuj pluraj bruselanoj, partoprenis al la jara bankedo en la salonoj « Magnus ». La Prez., S-ro M. Jaumotte, tradicie kaj solene festparoladis: li alvokis al daŭra, instiga laboro por la peticio al UNO. S-ro R. Jacobs, nome de la brusela grupo, bondeziris al La Verda Stelo kaj dankis pro la bona akcepto. S-ro H. Vermuyten deklamis fervore kaj pasie post kio S-ro E. Paesmans toastis je la sinjorinoj kaj honorigis ilin en la persono de la Prezidant-cedzino, S-ino Marg. Jaumotte, al kiu li transdonis belajn vivantajn florojn. Neatendite, F-ino Cl. Peeters respondis al la antaŭa paroladinto bonhumore kaj ŝerceme. Tombolo kun multaj premioj alternigis kun kantoj kaj muzi-

kajoj de Ges-roj Van Genechten, geamikoj kaj invititoj de S-ino G. Debacker.

La 4-an de februaro la Prez. de Brusela grupo, S-ro R. Jacobs, paroladis pri « Vojaĝo en Maroko » kaj prezentis bele kolorigitajn diapozitivojn. Bela programo kiu rezultigis el kunlaboro inter la antverpena kaj la brusela grupoj!!

La 11-an S-ro H. De Roover per vortoj kaj bildoj raportis pri vizito kiun li faris al la novaj grandegaj havenaj instalaĵoj en la norda parto de Antverpeno (i.a. la grandega markluzo) kaj klarigis multajn teknikajn realigojn. S-ro R. Van Eynde bonvole kompletigis la programon per dokumentaj filmoj.

Kvankam la 18-an S-ro E. Paesmans jam por la 3-a fojo paroladis pri « Grekujo », li tamen restis tiel interesa kiel la antaŭajn fojojn. La paroladisto tion pruvis ne nur per vortoj sed precipe per diapozitivoj!

En la kadro de E.K.I. (Esperanto-Komitato Intergrupa) de Antverpeno dum la semajnfino de la 19-a kaj 20-a, la urbestro de Deurne (antaŭurbo de Antverpeno), S-ro M. Dequeecker, malfermis Esperanto-ekspozicion en komuna lernejo kie li, en tre favoraj vortoj, bonvenigis la ĉeestantojn. S-ro M. Jaumotte, la Prez. de E.K.I., akceptis la oficialulojn (krom la urbestro ankaŭ kelkaj urbaj konsilantoj) kaj faris la enkondukan paroladeton. Multaj esperantistoj ĉeestis la solenaĵon. Pluraj vizitantoj subskribis la peticion de UNO kaj aĉetis librojn. Resume: bonega sukceso!

La 25-an, anstataŭ la parolado de S-ro G. C. Fighiera, prokrastita ĝis en marto pro teknikaj kialoj, la verdstelanoj sidis « Ĉirkaŭ la Fajro » kaj rakontis... S-ro Woessink, kasisto de UEA, vizitante la grupon, esprimis sian admiron por la multnombra ĉeestado de la gemembroj kaj la vigla aktiveco de la grupo. Li cetere gratulis la Prez. pro lia lerta gvidado de la sama grupo. Kunlaboris al la programo per amuza legajo aŭ poezia deklamado: S-ino R. Lecat kaj S-roj H. De Roover, Jo Haazen (per tre petola teksto kiun li tradukis kaj kun entuziasmo prelegis), M. Du Bois, H. Vermuyten, J. Verstraeten kaj R. Balleux.

La 4-an de marto S-ro H. Vermuyten prelegis pri « Dante Alighieri ». Serio da lumbildoj ilustris kaj kompletigis la

tekston kiun la paroladisto deklamis kun arda gusto kaj pasia temperamento. Nov-Zelanda samideano, vizitante la grupon, transdonis la salutojn de siaj samlandanoj.

### NEKROLOGO

S-ro Arthur Claes, iama fervora membro de la grupo mortis post iom longa malsano. Al liaj familianoj kaj parencoj ni esprimas niajn profundajn kunsentojn.

### BRUGA GRUPO ESPERANTISTA - REGA SOCIETO.

Post la ĝenerala jarkunsido de la 26-a de januaro, la grupa aktiveco koncentriĝis sur la du kursoj, kies lecionoj estis donitaj ĉiumarde: la elementa je la 20a kaj la perfektiga je la 21-a horo. Tiu lasta kurso vere ne konsistis el sekaj lecionoj, sed en praktikaj ekzercoj: legado, konkursoj, eĉ ludoj. Tiel okazis la 8-an de februaro: kartludado kaj la 15-an: konkursoj. La 22-an la grupanoj ekskursis al Oostkerke por tie kune vespermanĝi, post kio ili ĉeestis la Karnavalajn amuzojn en Damme. Forta delegacio de la grupo ekskursis, la 1-an de marto, al Oosten-

de, por ĉeesti en la granda salonego de la Kursalo tre interesan prezentadon de admirindaj premiitaj kolorfilmoj kaj - diapozitivoj. La 8-an, la federacia organo « Sonorilo » estis laŭlegata kaj komentariata. Konkurso pri eraraj desegnaĵoj okazis la 15-an. Escepte, la dua parto de la vespero de la 22-a de marto estis plenigita per komitata kunveno, kiu interalie decidis organizi E-ekspozicion dum septembro. La 29-an de marto, Ges-roj A. De Wasch-Rossel komentis sian vojaĝon al la Fjordo de Norvegujo, prezentante centojn da belegaj kolordiapozitivoj.

### Programo por estontaj kunvenoj:

MAJO: 3-an: Debato: La plej bela tago de Bruĝo - 10-an: Legado kaj klarigado de « Sonorilo » - 17-an: Priparolado kun kolordiapozitivoj pri Grekujo (2-a parto) F-ino. Y. Poupeye - 24-an: Lastaj preparoj por la Belga Kongreso Loveno - 31-an: Raportado pri la Belga Kongreso Loveno.

JUNIO: 7-an: Vespera promenado. Rendezvuo: Granda Placo - 14-an: « Ekskurso al Londono » parolado de F-ino. Is. Van Parys - 21-an: Vespera vizito al iu vidindaĵo - 28-an: Debato: Libertempaj proponoj.

### ESPERANTO UZATA DE RADIO-AMATOROJ

En Knokke-Zoute okazos de la 16-a ĝis la 18-a de septembro 1966-a, la 2-a Internacia HAM-Kunveno, speco de tutmonda kongreso de la radio-amatoroj.

La programo — ankaŭ eldonita en Esperanto — similas al tiu de multaj aliaj kongresoj, sed rimarkinda fakto estas ke en ĝi « Esperantista Kunveno » estas antaŭvidita.

Estas fakto ke la plej uzita korespondlingvo inter la radio-amatoroj estas speco de angladevena fakĵargono; sed tamen pluraj amatoroj fiere presigas sur siaj QSL-kartoj (ricevatestoj pri elsendoj) la mencion « Esperanto parolata ».

Antaŭvide al tiu 2-a Internacia HAM-Kunveno anoncis sin, el diversaj mondpartoj, multaj amatoroj kiuj samtempe estas esperantistoj.

Ĉiuj esperantistaj informoj pri tiu tritaga kongreso estas akireblaj ĉe: S-ro Karlo Poupeye (ON4PU), Karel de Stoute-laan, 78, Brugge (Belgujo) Tel. (050)15755.



manufakturaĵo firmo DE BROUWERE

Magdalenastraat, 29, Kortrijk (Belgiujo) - Tel. (056) 216 54

VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ  
" MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko  
la perfekta konfekcio  
fabrikita el plej bonaj svisaj teksaĵoj  
Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj

PRECIPAJ CENTROJ:

Antwerpen	: Aalmoezenierstr 2
	: Abdijstr 57
	: Anselmostr. 17
	: Nationalestr. 87
Arlon	: Marche-aux-Légumes 16
Brugge	: Breidelstr. 8
Brussel	: Galerie d'Ixelles 9
	: Anspachlaan 194
Eupen	: Kirchstr. 14
Gent	: Brabantdam 25
Herstal	: Rue Large Voie 4
Leuven	: Bondgenotenlaan 29
Luxembourg	: Place de la Gare 67
Mechelen	: Grootbrug 8
Roeselare	: Ooststr. 124
Tournai	: Rue Royale 75
Turnhout	: Herentalsstr. 6
Verviers	: Pont St. Laurent 2